


Esperanto en Danio

18-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2011



Frontpaĝo de la "Dua Bulteno" de UK

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Therkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 50 38 41 77 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.04.2011

Enhavo

LKK informas.....	3
Internacia simpozio.....	4
Dana strategio pri fremdaj lingvoj.....	5
Ib Schleicher.....	6
Mogens Groth Jørgensen.....	6
Næstved.....	9
Kopenhago.....	10
Paperaj gazeteltondaĵoj.....	11
“Familiaj rilatoj”.....	12
Uragana Vespero.....	14
Manĝebla esperantaĵo.....	19
Svedio estas mirinda.....	20
La trafoj de Lars Forsman.....	21
Nova retligilaro pri d-ro Zamenhof.....	22
Pri Esperanto kaj “Globish”..	22
Usono denove.....	23

LKK informas



Jam pasis 1 ½ jaro de kiam la LKK ekkomencis sian laboron kaj ni eniras la lastan hektikan duonjaron de la preparoj, kiam ni koncentriĝos al helpantoj kaj detalaj servoj.

Sur la kovrilpaĝo vi povas vidi la kovrilon de la Dua Bulteno kun unu el la gobelenoj, tiu de la vikinga periodo, kiun oni povas admiri en la reprezentaj ĉambroj de Christiansborg, kreita de nia elstara artisto Bjørn Nørgaard. La kabineto de la Reĝino kaj li mem donis la permeson al ni uzi tiun bildon, kaj li ankaŭ akceptis eniri en la Kongresan Honoran Komitaton, kune kun la kopenhaga urbestro pri kulturo Pia Allerslev, la pola ambasadoro Rafa Wiśniewski, la ĝenerala sekretario de la Dana UN-Asocio Thorleif Jonasson kaj la dana EU-parlamentanino Britta Thomsen. La vicurbestro de Kopenhago Frank Jensen akceptis esti la Alta Protektanto de la kongreso.

Dum la UK estas kutimo ke la gastiganta lando aranĝas diversajn prelegojn pri famaj personoj aŭ agoj, kaj ankaŭ tiu parto de la programo estas preskaŭ preta kun prelegoj pri niaj famaj sciencistoj Ole Rømer, H.C. Ørsted kaj Niels Bohr, pri H.C. Andersen, pri Gronlando kaj pri la dana jura sistemo. Mankas ankoraŭ eventuala prelego pri la vikinga periodo, kiu ja estas unu el la famaj periodoj de nia historio.

La nacia vespero okazos en la koncertejo de Tivoli kaj la kongresanoj havos tiamaniere la okazon eniri Tivoli senpage kaj ĝui la ĝardenon antaŭ kaj post la programo, kiun ni finpretigas ĝuste nun.

La hoteloj estas delonge rezervitaj kaj unu el ili, la Hotelo Bella Sky, la plej granda en Nordeŭropo, estos certe tre vidinda atrakcio, kun sia spektakla kliniĝo de 15 gradoj, sola en la mondo. Kompare, la fama turo de Pisa havas klinon de nur 8 gradoj!

Samtempe ni devas ne forgesi nian alian aranĝon: la konferencon kaj simpozion de ILEI, pri kiuj vi povos legi en la revuo.

Ileana Schrøder

Internacia simpozio

*Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado
Kopenhago, 22-23 julio 2011*



La internaciaj simpozioj okazantaj en kadre de la ĉiujaraj konferencoj de ILEI tradicie traktas temojn el la sfero de lingva pedagogio, lingva politiko kaj interkultura komunikado. Ĉi-foje ni deziras enfokusigi lingvajn problemojn en la scienca komunikado kaj en edukado pri sciencoj, inkluzive de la konflikto inter, unuflanke, la angla kiel fakte internacia lingvo de la scienca komunikado kaj, aliflanke, la bezono de nacioj havi kompetentajn sciencistojn edukitajn por komuniki science en la nacia lingvo.

Estas fakto, ke en multaj landoj oni studas kaj praktikas la sciencon esence en la angla, sed oni instruas ĝin en mezlernejoj kaj foje universitatoj en la loka aŭ regiona lingvo. Tiu forta konflikto inter la internacia lingvo de la scienco unuflanke kaj la dezirinda instrui sciencon en la gepatraj lingvoj (kaj eduki civitanojn kapablajn kompreni sciencajn demandojn kaj formuli politikon, ekzemple pri tutmonda varmiĝo) kreas multajn problemojn. Kiel entute fronti ilin?

Kaj kiel fronti ĝenerale la problemon, ke en multaj landoj la naciaj lingvoj estas neeviteble enen turnitaj, dum la mondo de la scioj etendiĝas eksteren? Kaj kiun rolon havas Esperanto, kaj ankaŭ la teknologio, en tiu konflikto de celoj?

Organizantoj:

Humanistika Fakultato de la Universitato de Kopenhago

ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

UEA/CED – La centro por Esplorado kaj Dokumentado de UEA.

PS: La aktoj de pasintaj simpozioj estas troveblaj en la retpaĝo de ILEI ilei.info, en la rubriko “Dokumentoj”.

Dana strategio pri fremdaj lingvoj

La 28-an de januaro mi kaj la vicprezidanto Finn Østerbæk ĉeestis kunvenon de “Forbundet Kommunikation og Sprog” kie oni diskutis la bezonon havi nacian strategion por fremdaj lingvoj. La ministroj de sciencoj kaj de edukado faris proponon tiurilate kaj la tasko de la kunveno estis diskuti pri la baroj, enhavo, kostoj kaj celo de tia strategio.

La ministrino pri scienco Charlotte Sahl-Madsen komencis prelegante pri sia opinio, kaj ŝi estis surprize pozitiva, kontraste al la antaŭa ministro kiu ĉiam prezentis la anglan lingvon kiel la solan solvon. Ŝi emfazis ke ni devas regi plurajn lingvojn, ĉar la angla lingvo estas necesa sed ne sufiĉa. Ni



devas havi bonajn sciojn pri fremdaj lingvoj en integriĝanta mondo, ĉar se ni fidas ke la angla sufiĉas, tio signifas ke ni fidas ke ĉiuj aliaj landoj lernas kaj scias ĝin, sed hodiaŭ 75% de la mondaj enloĝantoj ne scipovas la anglan.

Ŝi aldonis ke lingvo estas pli ol komunikilo, ĝi estas ankaŭ kulturo kaj ŝlosilo por kompreno kaj scio pri aliaj landoj, iliaj kulturo kaj historio. Danio estas malgranda lando, sed komercas kun multaj aliaj landoj en la tuta mondo, kaj aliaj lingvoj fariĝas estonte pli gravaj. Gravas ke ni faru la ĝustajn prioritatojn kaj estu flekseblaj.

Dum la debato pluraj instruistoj de fremdaj lingvoj emfazis siajn pensojn, precipe la instruistoj de la franca kaj germana lingvoj pledis pri la graveco de tiuj lingvoj. Ni mem emfazis la rolon de Esperanto pro ĝia propedeŭtika valoro, kaj sendis al la ĉeestantoj nian opinion pri la starpunktoj de nia movado. La tuta teksto de la mesaĝo estas legebla en nia retpaĝo:


<http://www.esperanto.dk>.

Ileana Schrøder

Ib Schleicher

(Århus, 15.07.1924 – Kopenhago, 21.11.2010)

Ib Schleicher kaj la homoj proksimaj al li estas konvinkitaj pri la eterna vivo, kaj rezulte de tio estas iom malfacile verkigi pri li nekrologon. Sed la nun forpasinta surtera enkarniĝo de Ib estis grava aktivulo por Esperanto en Danio, do la redaktoro de la tiunoma revuo taskis sin kunmeti kelkajn informojn pri li.



Ib naskiĝis en Århus, sed kreskis en Skagen. Profesie li estis ĉarpentisto, poste inĝeniero. En Horsens 1946 li renkontis Tove, al kiu li edziĝis en 1950. Ili ekloĝis en Kopenhago, kaj dum la jaroj ili ricevis tri filojn kaj du ĝemelajn filinojn.

Esperanton Ib eklernis meminstrue en 1950 kaj finlernis kadre de la Internaciaj Kursoj en Helsingør en 1952. Tie li renkontis la faman Cseh-instruiston Tiberio Morariu, kiu konsekvence parolis Esperante kun sia filino. Tio decidigis Ib ke Esperanto estu la ĉeflingvo ankaŭ en lia familio, kaj liaj gefiloj ĉiam parolis kun li en la Internacia Lingvo.

Inter la unuaj poresperantaj laboroj de Ib estis kontrolado de taskoj de koresponda kurso, gvidata de Mogens Rude Andersen. Meze de la 1960-aj jaroj li kunlabore kun Torben Kehlet modele organizis en Danio subskribkampanjon de UEA, kiu celis ke la Unuiĝintaj Nacioj okupu sin pri la lingva problemo. Komence de la 1970-aj jaroj li fariĝis prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo, kiun li forte modernigis – interalie la nomo de la ligo estis ŝanĝita al la nuna Dana Esperanto-Asocio.

Eksiĝinte kiel estrarano de DEA, Ib dediĉis sin al tradukado el la Dana en Esperanton. Eldonitaj tradukoj de li estas precipe verkoj de la pensulo Martinus kaj kelkaj fabeloj de Andersen.

Mogens Groth Jørgensen

(27.10.1913 – 24.12.2010 en Brøndbyøster)

Hodiaŭ matene telefone atingis min la trista informo, ke Kristnask-vespere forpasis en Hospitalo Hvidovre mia kara Nomfrato *Mogens Groth*. Sian korpon li testamentis al la studentoj de medicino ĉe la Kopenhaga Universitato.

Iun vesperon proksime al la 15-a de decembro 1942 – do dum la germana okupacio de Danlando – Mogens Groth faris viziton al tiutempe tre konata Kopenhaga amuzejo, *Gimle*. Li preterpasis tablon, ĉe kiu li aŭdis vortojn



tute fremdajn. “Kio okazas tie ĉi?” “Ni festas la naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof.” “Kiu estas li?” “La kreinto de Esperanto.” “Kio estas Esperanto?” “Ĝi estas internacia lingvo.” “Kiel oni lernas ĝin!” “Oni aĉetas lernolibron.” – La sekvan matenon iu sonorigas ĉe la pordo de Mogens Groth. Ekstere staras homo al li nekonata. ? ? ? “Mi venas de *Laborista Esperanto-Klubo* por donaci al vi lernolibron!” Mia Nomfrato

dankas kaj revenas al sia varma lito. Li ne leviĝas ĝis post la studado de la unuaj ok lecionoj. Amo je la unua vido!

Kvankam Mogens baldaŭ estis forte ligita al la rezista movado, li sukcesis trovi tempon ankaŭ por la Internacia Lingvo, ekzemple instruis en Randers. Post la militaj jaroj li vivtenis sin kiel muzikisto (kontrabaso), interalie en Svedio kaj Finnlando. Fine de la 1950-aj jaroj Mogens revenis al Danio kaj baldaŭ akiris postenon ĉe la Dana Ŝtata Arkivejo. Tra la jaroj li dediĉis multe da tempo kaj energio al la ‘vivo’ de la kultur-revuo *Norda Prismo*. Post la forpaso de lia ‘sangofrato’ *Ferenc Szilágyi* en 1967, *William Auld* transprenis la funkcion de ĉefredaktoro, sed tre grandan parton de la laboro fakte faris Mogens Groth. Multajn tre diversnivelajn kursojn li gvidis tra la jaroj. Organize li estis ligita al *Dana Laborista Esperanto-Asocio* kaj al *SAT*, ankaŭ al la lokaj societoj *Komuna Konversacia Klubo* (KKK), poste al *DEFA-Kopenhago*, en kies membrogazeto ofte aperis artikoloj liaj pri lingvaj kaj aliaj interesaj temoj, kutime subskribitaj per la pseŭdonimo *Felis*, la latina vorto por kato, aludo al porinfana dana kanto:

Mogens, Mogens missekat,

hvor var du forgangen nat?

Jeg var i et møllehus.

Der var nok af fede mus.

Det var mad for Mogens.

Mogens, Mogens ‘missekat’,

kie vi estis dum la pasinta nokto?

Mi estis en muelejo.

Tie estis multaj grasaj musoj.

Jen manĝaĵo por Mogens.

(*missekat*: *mis* estas infana/karesa nomo por *kat* (= *kato*)).

Dum multaj jaroj Mogens Groth havis leteran kontakton kun *Marjorie Boulton*, kiun li kutime titolis ‘missekatino’, kaj ŝi reciprokis per ‘mia missekat’. Post lia blindiĝo mi ofte helpis mian amikon surpaperigante liajn vortojn por Marjorie Boulton. Ĉiufoje mi aldonis personan saluton kaj kompreneble subskribis per jena titolo: ‘missekata sekretario’.

La du Mogens-oj interkonatiĝis komence de la 1960-aj jaroj; de tempo al tempo kruciĝis niaj vojoj. Ĉirkaŭ 1990 firme kunligis nin la laboro de la *Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono*. Dum la ofte tuttagaj kunsidoj en lia gastama hejmo ni parolis kaj diskutis ne nur pri Esperantaj kaj ekzamenaj aferoj, sed pri ĉio. Ofte ni konsultis unu la alian pri ‘gramatiklaj’ aferoj. Mi tre ĝojas, ke en mia Nomfrato mi trovis tre varman amikon. Lia kapablo krei amikajn rilatojn verŝajne estis bazita je lia talento vekti la senton en tiu homo, kiu ĵus sidas antaŭ li, ke li/ŝi estas speciale unika.

Dum multaj jaroj Mogens Groth serĉis informojn pri *Christian Nielsen*, kiu en 1890 eldonis la unuan danan lernolibron de Esperanto (Flensburg), kaj pri *Peder Kristensen Toksvig*, kiu en 1897 fondis la unuan danan Esperanto-societon, *Societo Esperantista de Danujo* (Nykøbing Sjælland); pri tiuj du danaj pioniroj oni trovas en la Esperanto-literaturo nur po unu mallongan frazon! Kelkajn jarojn post sia blindiĝo mia Nomfrato transdonis al mi sian iom ampleksan materialon pri Christian Nielsen kaj P. K. Toksvig por pluaj esploroj. Ĉiuj danaj esperantistoj parolas nur pri *Frederik de Skeel-Gjørting*, *Margrethe Noll* kaj *Marie Schrøder*; ili sendube estas gravaj personoj, sed la Mogens-oj opinias, ke la du unuaj pioniroj sur dana tero meritas pli ol po unu mallongan frazon en *Enciklopedio de Esperanto*. Tial tute intence mi dediĉis al ili lokon en la sama fako kiel *D-ro Zamenhof* de mia ekspozicio Esperanto en Danlando (2008). Mi ellaboris manuskripton kun la titolo *Fruaj Jaroj*. Laŭ la forta deziro de mia kara Nomfrato mi intencas meti ĝin en la Interreton; pri tiaj aferoj mi estas nekompetenta kaj tial tute dependa de aliaj.

(Pensoj esprimataj la 25-an de decembro 2010 en letero al s-ino Katalin Kováts, Nederlando; ŝi tuj petis permeson meti ilin en la “Panteonon” de edukado.net.)

Mogens Rude Andersen, Espergærde

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved,
tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.

Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝohoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj. Rigardu ankaŭ la hejmpaĝon: www.esperanto-i-naestved.dk.

Okazos:

- Ve 11.02 je 19.00: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.
- Ve 18.02 je 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN.
- Ma 22.02 je 14.00: Pitrakto de ĉapitro 39 de F+F.
- Ve 04.03 je 19.30: Danlingva prelego: Pastro Torben Petersen rakontos pri pastra laboro kaj travivitaj aferoj inter soldatoj, eble precipe en Afganio.
- Ve 18.03 je 19.00: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.
- Ma 22.03 je 14.00: Pitrakto de ĉapitro 40 de F+F.
- Ve 08.04 je 19.30: Sezonia aranĝo kun manĝeto, trinkaĵo kaj ujutno.
(Gloso: ujutno = rusdevena vorto kun signifo laŭ la dana hygge – siatempe lanĉita de Paul Neergaard).

Notu bone, ke la posttagmezaj studgrupoj nun okazos mardojn!

Okazis:

05.11. Lizeta K. parolis pri sia vivo kiel filino de tre aktiva Esperanto-paro kaj rememoris partoprenojn en infankongresetoj, institucio nun tute natura, sed en 1956 en La terglobo en Hellerup novaĵo. – 19.11. Diligenta laboro pri teksto kaj ioma konversacio. – 10.12. Jul-aranĝo en neformala etoso, sed nebona vetero malhelpis ĉeeston de kelkaj. – Longa paŭzo ĝis 25.01., kiam la cerboj denove estis streĉitaj pri kaj pro lingvaj aferoj.

Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, chatterjeebetty@hotmail.com. La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas **ĉiun lundon** ekde la 19:00 horo en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV. Vespermanĝo eblas en la kulturdoma kafejo. Ni troveblas ankaŭ en Facebook ĉe “Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo”.

Printempa programo

Februaro

14-a: Konversacia rondo. Ole Therkelsen gvidos pri la temo ‘la fina venko’.

21-a: La internacia tago de la denaska lingvo (la 20-a de februaro).

28-a: Jarkunveno de KEK.

Marto

7-a: Eliza Kehlet prelegas pri siaj plej ŝatataj libroj.

14-a: Ne jam planita.

21-a: Konversacia rondo: ‘Dialogo kaj reciproka kompreno’. Jen la temo de la ĉi-jara Universala Kongreso.

28-a: Studgrupo. Marvirinstrato. Labirintoj p. 134 – 141.

Aprilo

4-a: Jens S.Larsen prelegos pri la historio de la Dana biciklanta Asocio.

11-a: Kial vi ekzameniĝu, eĉ se vi pensas, ke vi mem ne bezonas diplomon pri viaj Esperanto-konoj? Al tiu ĉi kaj multaj aliaj deamndoj donas respondon la filmeto, farita de Cyrille Hurstel.

18-a: Konversacia Rondo.

25-a: Fermita pro la pasko!

Notu cetere ke la 2-an de majo Ole Stig Andersen danlingve prelegos pri la reta lingvo-muzeo (<http://sprog museet.dk/>) – evento diskoniginda al ĉiuj iom interesitaj pri lingvo, ne nur esperantistoj.

Pri la Zamenhof-festo 2010

Okaze de la 151-a naskiĝtagdatreveno de Ludoviko Zamenhof proksimume 40 esperantistoj, inkluzive kelkajn el Svedio, festis en la Nordokcidenta Kulturdomo la 12-an de decembro. La temo de la festo estis: ‘La familio zamenhofa estas ankaŭ nia.’

Unue ni ĝuis bongustan kaj ampleksan lunĉon en la komforta manĝejo. Post mallonga festparolado ni translokiĝis al pli granda ĉambro, kie ni plezore aŭskultis la ludon kaj kantadon de Amir, Matthias kaj Karl, kaj samtempe konversaciis pere de Skajpo kune kun kelkaj el niaj ‘familianoj’ en Ĉinio, Ĉilio, Rusio kaj Tajvano. Mikaelo Bronstejn el Rusio surprize telefonis al ni, kaj bele kantis, ĝis li malaperis pro telefonado el Usono.

Jens promesis al ni ian prelegon pri la zamenhofa familio. Li alternitive interpretis la temon per parolado pri la dana lingvisto Rasmus Rask; tutcerte nia majstro aprobus ĝin. La teksto troviĝas en alia artikolo ĉi-numere.

Post la kaftrinkado ni kantis kristnaskajn kantojn kaj Ole Therkelsen distris nin per vigla deklamado de poemo de H.C.Andersen.

Dankon al ĉiuj aranĝantoj kaj partoprenantoj.

Betty Chatterjee

Paperaj gazeteltondaĵoj

Novembro 2010

Prelego de Lizeta K. menciita 3-foje en Næstved-medioj.

Ugebladet Næstved: Asocia registro (i.a. tiu de EUN).

Fyens Stiftstidende: Foto de Ole Nederland kaj eksterlanda gasto en klaso kun Esperanto-instruado kaj mencio, ke tio okazis antaŭ 50 jaroj.

Decembro 2010

Jernbanefritid: Aŭtunaj (Esperanto-)aktivecoj

Januaro 2011

Radio vatikana: Radioprogramoj en Esperanto.

Ni daŭre insiste instigas vin sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Precipe en la nuna, kongresa jaro devus ja aperi abundo da mencioj pri niaj aktivecoj!

“Familiaj rilatoj”

Parolado de Jens S. Larsen en la Zamenhof-festo en Kopenhago

Oni petis min diri ion pri la familio de Zamenhof, sed familio povas esti multaj malsamaj aferoj. Ekzemple nia Ludoviko ankaŭ estas membro de la familio de lingvokreintoj. Mi ŝatus rakonti al vi pri unu el la pli interesaj Danaj lingvokreintoj, nome Rasmus Rask.

Rask estas unu el la plej famaj lingvistoj de ĉiuj tempoj. Li naskiĝis en Fueno en 1787 kaj mortis nur 55-jara en Kopenhago. Oni ankoraŭ nekredeble multe skribas pri li. Pasintjare eĉ aperis romano pri li – “Rudimenter af R” de Hanne Marie Svendsen. Rask laboris pri multaj lingvoj, kaj li ankaŭ opiniis ke oni povus fari internacian lingvon. Povas esti interese vidi kiel li longe antaŭ Zamenhof venis al la ideo ke tia lingvo estas havinda kaj farebla.

Por serĉi la plej profundajn radikojn de la Dana lingvo, Rask faris grandan vojaĝon al Hindio tra Rusio, kun longaj haltoj en Stokholmo kaj SanktPeterburgo. En Peterburgo li rimarkis ke oni tie tute ne konas la Danan literaturon. Tio tre ĉagrenis lin, sed precipe ĉagrenis lin ke la Germanaj intelektuloj, kiuj estis multaj en la Rusa ĉefurbo, tute malestimis la Skandinaviajn literaturojn.

En unu el siaj leteroj hejmen li priskribis unu el la konversacioj kiujn li havis kun Germana profesoro:

- Sed kial vi ne skribas germane anstataŭ dane?
- Ĉar ni ne estas germanaj, sed danaj.
- Dio mia, kia ideo estas tio, fari literaturan lingvon el tia dialekto kiun parolas apenaŭ unu miliono da homoj, kio povos fariĝi el tio?
- Ĉe senpartiaj juĝantoj tio nin des pli honoros, ju pli malgrandaj ni estas, kiam ni tamen sukcesis doni al nia lingvo literaturon kiu ne malsuperas tiujn de dekoble pli grandaj lingvoj.
- Vi ja ĉiuokaze havas Ĝermanan devenon, estas do el bona tribo, sed kia strebo estas tio, apartigi sin el la granda tuto?
- La dana nacieco estas proksimume la sama kiel la Germana, kaj ni ankaŭ ne disigis nin el iu granda tuto, sed nur asertis la starpunkton kiun indikis al ni la naturo, kaj kiun ni, mi esperas, ankoraŭ dum kelka tempo asertos.

Estas iom surprize ke Rask venis al la ideo fari internacian planlingvon, ĉar laŭ li, la lingvo estas natura fenomeno. Sed kvankam Rask estis patrioto, li ne estis naciisto. Li defendis ĉiujn pli malgrandajn naciojn kontraŭ la pli grandaj – ne nur la Danan kontraŭ la Germana.

Ekzemple, en unu el siaj leteroj hejmen, li priskribas la diversan sorton de la Finnoj, la Estonoj kaj la Ingroj. La **Ingroj** estas la Finna popolo kiu origine loĝis sur la teritorio de SanktPeterburgo. **Finnlando** tiutempe estis parto de la Rusa regno, sed kiel memstara grandduklando. La kleruloj parolis Svede aŭ Finne. En **Estonio** la kleruloj parolis nek Estone, nek Ruse, sed Germane. Rask tre subtenis la evoluigon de la Finna lingvo, kiu tiutempe komencis prosperi, kaj li multe bedaŭris la sorton de la Estonoj, kaj precipe de la Ingroj.

En Peterburgo Rask multe laboris por interesi la Rusojn pri la Danaj lingvo kaj literaturo, kaj fakte li ricevis unu diligentan disĉiplon, nome profesoron Ivan Lobjko. Ni scias ke Lobjko tre bone lernis la Danan, ĉar poste li skribis al Rask kaj aliaj Danoj kelkajn leterojn, kiuj estas konservitaj.

En 1822 Lobjko translokiĝis al Vilno, la nuna ĉefurbo de Litovio. En longa letero al Rask li priskribas la tiean lingvan situacion:

Mia loĝloko estas tre interesa al lingvoesploristo. La nordan parton de la vilna gubernio konsistigas Ĵemajtio. La dialekto de ĉi tiu regiono estas branĉo de la litova. En la suda parto de la gubernio, ĉirkaŭ Grodno, Minsk kaj Vitebsk, kelkloke troviĝas disaj vilaĝoj de litovoj kiuj ankoraŭ parolas litove. Cetere la homoj tie parolas “wasserrussisch”, same kiel ankaŭ en Bjalistoko. La praloĝantoj do estas aŭ litovoj aŭ rusoj; la nobeloj male estas poloj, kaj ili interrilatas kiel estonoj kaj germanoj, aŭ finnoj kaj svedoj.

Tiu dialekto kiun Lobjko nomas “wasserrussisch” aŭ “akva rusa” estas tiu mezaĵo inter la pola kaj rusa kiun oni nuntempe nomus belorusa. Mi opinias ke tio estas tre interesa informo pri la lingva situacio en la regiono de Bjalistoko dum la 19-a jarcento. – Sed ni revenu al Rask.

En Rusio Rask do spertis kiel la lingvoj povas konflikti inter si. Sed en SanktPeterburgo li ankaŭ ofte havis la okazon paroli ĝis ses malsamajn lingvojn en unu tago. Rask estis treege lingvolerta, sed konstante ĵongli

inter ses lingvoj estis iom multe eĉ por li. Li do sincere ekinteresiĝis pri neŭtrala, tuthomara lingvo, en kiu li povus skribi legeble por ĉiuj, ne perfidante sian nacion. Li komencis labori pri tio, kaj tra la tuta vojaĝo li laboris pri ĝi, kiam estis liberaj momentoj en la studado de la aliaj lingvoj.

Rask nomis sian lingvon “lingváž generale” aŭ “lingváž universale”. Ĝi neniam ricevis difinitan nomon aŭ difinitan formon. Ŝajnas ke li neniam parolis kun iu pri sia projekto. Reveninte al Kopenhago li fine rezignis; komence de la manuskripto, kie li skizas sian lingvon, li skribis: *In magnis voluisse sat est* – tio estas latina citaĵo kiu signifas “En grandaj aferoj sufiĉas esti volinta”. Li ne povis scii ke precize en la centa jaroj post lia naskiĝo aperos Esperanto. Li sendube estus tre simpatia al Esperanto, ĉar ĝi estas konstruita tute laŭ liaj ideoj pri internacia lingvo.

Ĝis nun la biografiistoj de Rask flankenŝovis lian lingvoprojekton kiel ion neesencan. Sed en la lasta biografio, de Kirsten Rask en 2002, estas subĉapitro pri ĝi. En la longa daŭro oni ne povas ignori la lingvoprojekton de Rask. Al ni Esperantistoj kompreneble estas interese ke li laboris pri la sama afero kiel Zamenhof, kaj jam en 1916 aperis artikolo pri tio en la Esperanta gazetararo. Sed la fakto ke li laboris tiel serioze pri la demando, kvankam li rigardis la lingvon kiel natura fenomeno, ankaŭ estas lingvistike tre interesa, kaj mi esperas mem kontribui al tio dum la venonta jaro.

Uragana Vespero

Novelo de Betty Chatterjee

Pluvegis kaj blovegis! Laŭ la meteologo, saĝuloj restus hejme televidante. Tamen estis lunde vespero, do dekduopo da persistemaj membroj kuniĝis en la Esperanto-klubejo. Pro la grava temo de la vespero: ‘La akuzativo kaj aliaj faliloj’, eĉ tertremo ne estus taŭga preteksto por resti hejme. Atendante Peĉjon, la lertan preleganton, kiu ankoraŭ ne atingis la kunvenejon, la grizhararaj kaj multfaltaj membroj altabliĝis kafrinkante, kukmanĝante kaj babilante. Ĉu krokodilante? Kompreneble ne! La ŝercema kasistino Metinjo ofte diras al ni: “Se estus monpuno por la krokodilado, ni havus ege eminentan ekonomion.” Tamen ŝi estas tiel ŝercema kaj distrema.

Finfine aŭdiĝis pezaj paŝoj: “Bone, jen Peĉjo”, anoncis Prezidanto. Tamen, ne estis Peĉjo. Anstataŭe eniris la ĉambro la malsekega kaj frostigita Joĉjo, kiu ĝoje ekkriis:

“Karaj geamikoj mi havas mirindan novaĵon por vi! Ho kia mirinda mondo! Imagu, finfine la homaro scipovas kontakti ne nur siajn samtempulojn, oni ja ankaŭ povas saluti tiujn, kiuj jam forpasis al pli feliĉa mondo! Kvankam mi konfesas al vi, ke ties praktika kielajo estas al mi grandega misterio. Verdire multaj (bonege funkciante por aliaj) mirindaĵoj estas ankaŭ for de mia kompreno. Nia estimata kolego, Viktor el Jekaterinburg ĵus sendis retpoŝtmesaĝon al la tutmonda esperantistaro petante, ke okaze de la 151-a naskiĝdatreveno de nia Majstro, ĉiuj sendu al li gratulegojn.”

“Al Viktor?” demandis iu.

“Ne, al Doktoro Ludoviko Zamenhof!” Kaj Joĉjo malpli entuziasme aldonis: “Cetere li ankaŭ petas sincerajn raportojn pri la bonfarto de la Esperanto-afero. – Ho, mi preskaŭ forgesis alian informeron. Pro la uragano Peĉjo decidis resti hejme; li petis al mi, ke mi transdonu al vi elkorajn salutojn.”

Post tio eksplodis ŝokita silento mallonge daŭrante.

“Kia malfortulo! Peĉjo estas tute nefidinda!” grumblis Unjo.

“Stultulino, forgesu Peĉjon! Ĉu vi estas tute surda? Ĉu vi ne komprenis la informojn de Joĉjo?” Respondis Duĉjo.

“Sensencaĵo!” blekegis Triĉjo pugnante la tablon.

“Nu, kvankam mi estas trompebla, mi dubas pri tio,” prudente murmuris Kvanjo.

“Eĉ se nuntempuloj kredas je la fina venko de teknikaĵoj, supozeble ekzistas ja limoj, ĉu ne?” murmuregis Kvinĉjo.

“Ne estu tiel dubemaj! De tempo al tempo oni flustre informis al mi, ke nia Majstro delonge fariĝis skajpano kaj vizaĝarano,” aldonis Senjo, junulino kvindekjaraĝa.

“Supozeble vi ankaŭ asertas, ke li havas retpoŝtadreson, ĉu? Jen ridinda ideo!” ridege respondis Kvinĉjo.

“Ne gravas pri adreso lia, ni evitu la problemon sendonte la raporton al nia afabla kolego en Jekaterinburg; li certe akceptos la defion plusendi la

raporton al Doktoro Zamenhof,” indigne respondis Senjo.

Tiam Metinjo paceme murmuris: “Mi ĉiam fidus je la informoj donitaj de Joĉjo, tial laŭ mia opinio ni ne plu diskutu ĉu li vere ricevos la raportojn aŭ ne, ni agu. Nun jam 123 jarojn ni ja iras ‘la vojon celitan’, tial ni nepre sendu al nia kara Majstro raporton pri la progreso, ĉu ne?”

“Vi pravus, kara amikino! Ne disputu! Ni akceptu la defion! Hodiaŭ ni forgesu pri gramatikaj faliloj Nun ni parolu pri la enhavo de la raporto. Mi gvidos la diskutadon. En ordo, ĉu?” proklamis Prezidanjo, kaj ĉiuj kapjesis.

“Bone! Kion ni skribu, kaj kion ni evitu skribi?”

Denove eksplodis silento.

“Do, ĉu ni progresas aŭ malprogresas?”

“Dependas de la vidpunkto,” diris Seĉjo, unu el la ĝisnunaj silentuloj. “Nia Majstro precize prognozis ‘longan laboron’ kaj perditajn semojn. Pezegan laboron kaj ofte perditajn semojn ni jam spertadis. Tamen ĝis nun ‘la celon en gloro’ ni ne atingis kaj ‘la fina venko’ restas ie trans la horizonto. Aliflanke la fakto ke ni estas ĉi tie dum uragano pruvas ke kelkaj el ni ankoraŭ kredas je la ideo kaj penas sekvi la vojon, ĉu ne?”

Ĉiuj silente kapjesis kaj Prezidanjo diligente skribis.

“Laŭ mia opinio, diris Joĉjo, ni nepre memorigu la Majstron pri lia vizito al nia urbo, ĉu ne? Ni skribu:

Ĉu vi memoras, ke vi iam vizitis nian urbon? Jen la plej ora epoko de la Esperanto-movado. Krom la turismaj ĝojoj vi travivis la gastemecon esperantistan. Gravaj personoj ankaŭ bonvenigis vin. Nur la vetero estis negastigema. Certe vi memoras la junecon, la entuziasmon kaj la gajecon de niaj prakolegoj. Certe la solaj krokodiloj, kiujn vi tiam vidis, estis la krokodiloj en la bestoĝardeno. Verŝajne li estis ege imponita.”

“Kara amiko, jes, jen unu el la plej gloraj epokoj en la historio de Esperanto. Tamen tiu ĉi diskuto temas pri la nuneco de nia agado. Se li revenus ĉi tien morgaŭ, ĉu li estus egale imponota?”

Denove ĉiuj eksilentis gratante la kapojn kaj cerbumante kion skribi.

“Ni nepre informu lin, ke ĉi tie oni perfide preferas lerni la anglan, kaj pro la angla ni ne jam sukcesis,” proponis Unjo.

“Sensencaĵo!” murmuregis Prezidanjo, “ni ne kulpigu la anglan!”

“Pardonon! Ho mi havas ege bonan ideon. Jen la naskiĝdatreveno lia, do anstataŭ raporto ni sendu al li naskiĝdatrevenan donacon. Tiel senvorte ni komprenigos lin pri la granda evoluo de nia lingvo. Mi proponas donaci al li la plej novan PIV-on, aŭ la ‘Plenan Manlibron de Esperanta Gramatiko’, aŭ la festlibron ‘La arto labori kune’ aŭ la ‘Enciklopedion de Originala Esperanto Literaturo’. Se aliaj pli distremaj koleganoj malakceptas la proponojn, ni povos donaci al li amuzajn librojn kiel ‘Marvirinstrato’ aŭ ‘Tinĉjo en Tibeto’. Kion vi opinias?”

Joĉjo kapneis dirante:

“Ne taŭgas, ĉar eĉ se li aprezus iun ajn donacon, li petegas al ni, ke ni sendu honestajn raportojn el ĉiuj regionoj esperantujaj pri ties agado aŭ malagado. Ni ne prokrastu.”

Tiam brue eniris en la klubejon altstatura kaj entuziasma junulo portante grandan dorsosakon.

“Sal! Ĉu vi jam aŭdis la novaĵojn pri nia Zam? Mojosege, ĉu ne?”

Joĉjo kolermiene fiksrigardis lin kaj sible respondis: “Saluton, Maĉjo! Jes, ni jam aŭdis la novaĵojn pri nia kara Majstro Doktoro Ludoviko Zamenhof.”

“Saluton kaj bonvenon Maĉjo! Grave estas, ke ni memoru respektplene la signifon de ĉiuj radikoj – salo estas kondimento, ne salutmaniero, ĉu ne? Kaj memoru, ke mojos’ estas neologismo, kaj ĉi tie ni evitas neologismojn,” riproĉetis Metinjo, “tamen pli grave estas, ke ni konsentiĝu pri la enhavo. Maĉjo pri kio, laŭ vi, ni skribu?”

Ridetante Maĉjo eksidis apud Seĉjo kaj diris: “Ho ve! Elkoran pardonpeton pro lingva pekado! Do, kion vi skribis?”

“Nenion ankoraŭ,” konfesis Prezidanjo.

“Bone, do laŭ mia opinio ni eku per priskribo de la nuntempa situacio en nia malpaca mondo. En la 21-jarcento abundas etnaj, lingvaj kaj religiaj konfliktoj tiel kiel en la epoko de la Majstro. Pro tio li eltrovis pacigan komunikilon Esperanto. Jen bonega solvo, tamen nek tiam nek nun ni sukcesas konvinki la homaron pri ĝiaj saĝeco kaj utileco. Nek malesperu nek malpacienca. Vi evoluigante nian lingvon amatan kuraĝe, obstine, konstante, ignorante insultojn kaj mokojn iradis la vojon. Per gastado, per

gastigo, per kantado, per klubado, per kongresado, per lernado, per parolado, per skribado kaj per riproĉado al lingvaj pekuloj kiel mi, vi prizorgis... ”

“Dankon pro la belaj kliŝoj Maĉjo, tamen ni, kaj la movado baldaŭ mortos! Kie estas niaj heredontoj? Junuloj fajfas pri la estonteco de nia afero!” amare interrompis Kvinĉjo.

“Male, Kvinĉjo!”

“Kie vi do estas, kiam ni bezonas vian helpon esperantumi? Vi rete kaŝludas, ĉu ne?”

“Retemaj, jes sed kaŝemaj ne. Ni rete esplorvojaĝas tra Esperantujo eltrovante milojn da ne antaŭe trovitaj samideanoj, kiuj rete lernis la lingvon kaj esperantumas – ĉiutage, ne nur ĉilunde.”

“Ĉiutage? Do kiel? Kun kiuj?”

“Per Skajpo, per Vizaĝaro ktp. ili amikiĝas kaj ekzercadas sin Esperante. Kelkfoje ili duope parolas. Kelkfoje ili skribkonferencas dekope, dudekope eĉ pli. Kelkaj el ili konference voĉbabiladas.”

“Pri kio ili babiladas?”

“Dependas de la interesoj de la partoprenantoj. Ekzemple hodiaŭ ruso, brazilano kaj ĉino vigle diskutis pri neologismoj. Post tiam ĉina policano rakontis pri sia preferata manĝaĵo, kaj bulgarino donis al ni recepton por karvarmo. Hieraŭ estis 15-jarulo, kiu lerte kaj flue instruis al ni pri Orenburg.”

“Orenburg? Kio estas tio?”

“Regiona ĉefurbo apud la Ural-rivero en Rusio. Cetere interalie li rakontis al ni, ke Jurij Gagarin iam loĝis tie. Plue la junulo diris, ke en la tuta regiono li havas kontakton kun dek samideanoj, rete kun cento.”

“Jurij Gagarin, ĉu vere? Mi memoras lin! Interese! Tamen ĉu tiu ĉi bonparolanto ankaŭ konas la historion de nia movado, kaj ĉu li konscias pri la graveco de nia movado?”

“Tute ne! Vi scias centoble pri la historio kaj la movado. Tamen li regas la lingvon eĉ pli bone ol vi, Triĉjo.”

Jen denove eksplodis ŝokita silento.

Tiam Seĉjo elstaris dirante: “Jen la solvo. Ni skribu al la Majstro, ke

bedaŭrinde ni ne jam atingis la celon celitan. Tamen pro nuntempaj teknikaj mirindaĵoj kaj per Esperanto pli kaj pli da homoj tutmonde amikiĝas kaj ekkomprenas unu la alian. Sciante ke, multaj el tiuj ĉi nekredeble brilaj lingvaj uzantoj ne konscias pri la graveco de la filozofio, la historio kaj la movado, ni, kiuj konscias pri tiaj aferoj, havas novan defion. Ni ekkonstruu ponton de nia mondo al ilia mondo. Do, geamikoj, jen la unua paŝo! Ni fariĝu skajpanoj kaj vizaĝlibranoj!”

“Jes!” ĝojkriis Senjo, “certe se nia majstro vivus nuntempe li estus la plej vigla retvojaĝanto en la tuta mondo. Maĉjo, ĉu vi kunportas vian tekokomputilon?”

“Kompreneble, kial?”

“Ni skajpu! Mi volus konatiĝi kun la ĉina kaj bulgara geamikoj. Tre plaĉas al mi la kuirado.”

“Frivolulino,” siblaĉis Kvinĉjo, “ni ne malŝparu la tempon babilante pri manĝaĵo. Ni klerigu ilin. Jen nia tasko.”

“Male Kvinĉjo!” replikis Prezidanto, “ni klerigu unu la alian, kaj ne per insultoj kaj riproĉoj sed per reciproka respekto. Do antaŭen Maĉjo, kaj antaŭen ni ĉiuj. Eble la vojo ne estas tiel longa, kiel ni supozis.”

Manĝebla esperantaĵo



La profesia ekspoziciego SIAL okazis apud Parizo inter 17a kaj la 21a de oktobro 2010. Inter ties pli ol kvinmil budoj, unu el la grandaj estis tiu de Triballat. Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakaĵo de la jogurtoj Sojasun tute en Esperanto! Ĝi estis prototipo tie prezentata estante kandidato por novigpremio. Esperantigis ĝin la kompanio LinguaForce en Rennes.

En artikolo de la septembra numero de la profesia revuo CFIA, Olivier Clanchin, estro de Triballat, klarigas sian intereson por Esperanto.

[ret-info]

Svedio estas mirinda

Sveda jarkongreso 13-15 majo 2011

En Stockholm, la ĉefurbo de Svedio, okazos sveda jarkongreso en majo 2011. La programo enhavos interesan prelegon de Katalin Kováts, kaj mallongajn prelegojn de Konstantin Andreev kaj Megan Case. Estos tempo por diskuti ideojn pri aktivecoj rilate al instruado de esperanto. Krome estos pluraj jarkunvenoj.

Por informoj konsultu www.esperanto.se,
aŭ skribu al sefkongr2011@esperanto.se,
aŭ al la oficiala adreso de Sveda Esperanto-Federacio:

Svenska Esperanto-Förbundet
Vikingagatan 24
SE-113 42 Stockholm

Ulla Luin (jarkongresa kasisto)

Somera kurso

Somera Esperantokurso dum la semajno 11/7 - 16/7 2011 bonvenigas vin!

Infangrupo kaj 3 niveloj por plenkreskuloj estas planitaj. Ĉirkaŭ 6 horoj da instruado ĉiun tagon kun spertaj internaciaj instruantoj.


Interesa? Kontaktiĝu kun ni kaj ni sendos al vi kompletan kursprogramon kun prezoj kaj formularo por via aliĝo al ĉi-jara kurso:

Esperanto-kursejo
Stiftelsevägen 1
SE-680 96 Lesjöfors
Svedio

Telefono: +46 (0)590-30909, poŝ- +46 (0)7675455

Retpoŝto: egarden@esperanto.se
aŭ rekte al Lennart: kles@tele2.se

La trafoj de Lars Forsman



Multajn antaŭjuĝojn la esperantistoj devas kontraŭbatali: ke Esperanto minacas la naciajn lingvojn – ke Esperanto havas neniun kulturon – ke ĝi esats artefarita kaj malmultvorta, morta lingvo. Ke ĝi estas senutila, kaj multe pli. En sia svedlingva libro “Esperanto – över 50 miljoner träffar” Lars Forsman kredinde kaj logike dispelas tiajn opiniojn pri la “frata lingvo”, kiel li karakterizas Esperanton. La titolo estas aludo al la nombro de trovoj, kiujn oni ricevas serĉante per Google la vorton “Esperanto”.

Forsman estas multjara instruisto en popola altlernejo kaj evoluigis metodon por krei pozitivan komunecon inter diversnaciaj Esperanto-lernantoj. Tie li ankaŭ povis helpi sin per lingva laboratorio, kaj en la libro li rakontas ankaŭ pri siaj tiurilataj spertoj. Tiamanere la libro povas interesi ne nur interesitojn pri Esperanto, sed ankaŭ tiujn pri pedagogio. Ĝi ne estas vera lernolibro, tamen oni ekhavas klaran impreson pri la lingvo.

La libro ankaŭ enhavas kelkajn amuzajn vinjetojn:



Esperantos snabba spridning ut över världen saknar motsycke.



– Kiel ili sukcesis disvastigi Esperanton al la tuta mondo! Kaj sen milito, konkero, koloniigado! (La rapida tutmonda disvastiĝo de Esperanto estas senkompara).

– Ĉu ni bezonas ankoraŭ plian lingvon en la mondo? Jam ekzistas ja 5.000!
– Jes, ĝuste tial!

Nova retligilaro pri d-ro Zamenhof

En la retejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio <http://www.esperanto.cz> (rubriko Aktualajoj) aperis freŝnova retligilaro, kompilita omaĝe al 151-a naskiĝdatreveno de d-ro Zamenhof.



La listo enhavas retligilojn al informoj pri lia vivo kaj verkaro kaj pri verkoj skribitaj pri li. Ne temas nur pri artikoloj kaj skanitaj kaj elŝuteblaj elektronikaj libroj, sed ankaŭ pri fotogalerioj, kantoj, videofilmetoj k.t.p. Ne mankas ankaŭ aŭtenta registraĵo de lia voĉo kaj mallonga filmregistraĵo de lia prezentiĝo dum la UKo en Barcelono en 1909. La listo espereble

estos plu kompletigata kun helpo de la uzantoj. Rimarkojn kaj novajn informojn bv. sendi al:

komputado@esperanto.cz.

Pavla Dvořáková

Pri Esperanto kaj “Globish”



La 20an de oktobro okazis angla-lingva diskuto pri “Globish”, aŭ la tuttera angla, en la ĉefe araba televid-kanalo Al-Jazeera. La partoprenintoj estis Robert McCrum kaj (maldekstre) Robert Phillipson



(dekstre). McCrum lastatempe verkis libron kun la titolo “Globish”, kaj Phillipson estas profesoro multjare okupiĝinta pri temoj rilate al lingva imperiismo.

La diskuto estas arkivita ĉe:

<http://english.aljazeera.net/programmes/rizkhan/2010/10/201010209328966727.html>

Usono denove

La bonaj novaĵoj el Usono, kiujn ni priraportis pasint-numere, daŭras plu. Ĉiujare okazas Zamenhof-simpozio decembre en Nov-Jorko, kaj la ĉi-foja estis sukcesego. La ĉeesto de du membroj el unu el la plej famaj familioj en Usono, la familio Soros, allogis dekon da ĵurnalistoj.

George Soros ĉeestis eble dum horo kaj prelegetis dum 10-15 minutoj. Dum la pliparto de la programo ĉeestis Jonathan Soros, nepo de nia fama Teodoro Soros. Humphrey Tonkin donacis al la familio Soros la novan eldonon de *Modernaj Robinzonoj* de Teodoro Soros.



Partoprenantoj de la simpozio; meze Tonkin kaj G. Soros, dekstre Neil Blonstein.

Sam Green, kiu jam faris la filmon “Utopia in four movements” (Utopio en kvar movadoj/movimentoj), kie Esperanto okupas kvaronon, nun publikigas dokumentan filmon tute pri Esperanto. En intervjuo al Libera Folio li klarigas:

– Mi sentas ke preskaŭ ĉiuj esperantistoj, kiuj venis vidi la filmon “Utopia in Four Movements” reagis pozitive al ĝi. Unu eĉ skribis al mi poste, ke ĝi estis “la plej kortuŝa prezentado dum mia vivo”. Kelkaj homoj vidis fruan ĉerpaĵon en la reto, kaj reagis kritike, sed tiu opinio ne baziĝas sur vera kompreno de la tuto.

– La “ordinara” dokumenta filmo, kiun mi nun estas finfaranta, “La Universala Lingvo”, estas tradicia tridekminuta filmo, kun intervjuoj kaj similaĵoj. Ĝia direkto estas multe pli tiu de profunda historio de Esperanto kaj portreto de la nuntempa Esperanto-movado. Ĝi rigardas Esperanton ne tra la prismo de utopio. En ĉi tiu nova filmo aperos Renato Corsetti, Humphrey Tonkin, Arika Okrent kaj multaj aliaj parolantoj de Esperanto.

Z-festo en Kopenhago

*Skajpado kaj muzikado
preparataj de
Betty Chatterjee kaj
Matthias Dalmose*



*Jens S. Larsen
parolas pri
Rasmus Rask*



*Ole Therkelsen deklamas
H.C. Andersen*



*Ileana Schröder reklamas por la libro
"Zamenhofstrato"*